

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº6, Aŭgusto, 2009

*Kara Leganto! Fino de Julio, krom la solena inaŭguro de la UK en Bjalistoko, nome al la E-societo de Ŝikago donacis du interesajn eventojn: la tradicion piknikon kaj planatan klubkunsidon kun interesa temo fare de interesa preleganto*

## Pikniko'09



Tradicia pikniko de 2009, kiu ĉi jare okazis trian fojon post la renovigo en 2007, estis organizita en pitoreska arbar-rezervejo de Schiller Park'. Kolektiĝis pli ol 20 gesamideanoj el diversaj lokoj de nia ŝtato, kaj ne nur: venis aktivuloj de Universitata de Ilinojo en Ŝampano. Ankaŭ posedo de la lingvo estis prezentita en la tuta skalo – de komencantoj (kaj nur lingvaj simpatiantoj) kaj ĝis perfektuloj. Oni devas menciigi la aĝon de partoprenintoj: la plej juna estis Davido-Armano (3 monatoj), pri la plej maljuna vi povas diveni de la foto. Kaj finfine: la organizantoj ricevis multajn laŭdojn de la partoprenintoj. Bonvenon al E-pikniko'2010!

## “La Historio de Mia Domo”

Jes, vi ne eraris, nome al la historio de sia domo dediĉis temon de prelego dum la lasta kunsido de la E-societo nia aktivulo Marko Ŝafrot (Shafroth). La prelegon mem oni povas dividi je du partoj – teoria kaj aplika. Al la unua parto estis donita la kromtitolo “Kiel esplori la historion de unu domo”. En la komenco de sia elpaŝo s-no Marko informis pri la fontoj, de kiuj ĉiu ekintereso povas ĉerpi datenojn por kompili historion de iu domo. Inter ili povas (devas) esti urbadresaro, transdonatestoj, havaĵimpostdosieroj, mortatestiloj, nekrologoj, ĵurnaloj, popolnombro ktp. Krome, la aŭtoro akcentis, ke ĉiuj homoj rajtas esti memorigataj. Dum la esploro povas okazi, ke vi trovos iun (ion), pri kio neniu antaŭ vi sciis, do, okazos speco de iu mistero aŭ enigmo. Sed, ne dubu, vi povas kontentigi scivolemojn de aliaj homoj. Vagante tra la urbadresaro provu difini, kiu loĝis ĉe la adreso kaj kio estis li/ŝi (laŭ fako). Estu singarda, ofte la aĝaj dokumentoj en la arkivejo ne estas bonkvalitaj, vi povas perdi la “ruĝan fadenon”, sed, ne forgesu, viaj provoj kaj penoj nepre estos premiitaj kaj vi ricevos deziratan frukton – bildo de via najbareco!



Retroiru tra la ĉeno de posedintoj; malkovru, kiel la priskribo de la parcelo ŝanĝiĝis. Se iam pro la nepago de imposto la parcelo fariĝis kiel posedaĵo de la registaro, la

ĉeno povas rompiĝi. Iam malfacilas legi la dokumentojn, ĉar ili estas manskribitaj; iam malfacile eblas distingi inter posedinto kaj loĝinto. Ofte arkivaĵoj povas helpi al oni priskribi la personaron, inkluzive kun najbaroj, konatuloj kaj amikoj. Mortatestoj sciigas la esploristo(j)n pri la dato de iu morto, kialon de la forpaso (malsano, akcidento, murdo ktp), raportint(ist)o de la morto. Nekrologoj povas helpi al vi priskribi la vivon de la mortinto, li(ŝi)ajn posteulojn, hobiajn, kredon religian. Popolnombrado sekvas iun familion kun: ĝi enhavas naskiĝdatojn, sekson. Rezultoj de la 1890-popolnombrado estis forbrulitaj, sed nun haveblas rezultojn de 1940-popolnombrado.

Finfine, s-ro Marko transiris al la praktika priskribo de la domo ĉe 124 N. Baldwin: ĝi estas aplika kaj la plej interesa parto de lia prelego. Ek! Dank'al multfoja vizito de biblioteko estis trovitaj preskaŭ ĉiuj loĝintoj de la domo inter 1883 kaj 1979 jaroj. Kaj ne nur iliaj nomoj, sed ankaŭ profesio, familistato ktp. Sed ne nur nomoj de dom-okupintoj, sed ankaŭ tiuj de najbaroj. Bedaŭrinde, mankas informo de kelkaj fruaj jaroj. Pro la krizo (ne hodiaŭa) multoj perdis preskaŭ la tutan havaĵon kaj la domo apartenis al la urbo aŭ regionaj instancoj. La domo havis krom-nomon kaj en 1852 apartenis (kun la tuta bloko) al iu LJ Farwell, kiu poste perdis ĉion. Sed en 1867 Frank Maßing pagis la imposton. En 1874 la valoro de havaĵo atingis \$450.00 (imagu kaj komparu kun nuntempaj prezoj). Poste unu el loĝantoj, Joseph Huebel dronis, alia – Joseph Wermuth – pereis en trajna akcidento. John Longfield estis mortpafita kaj Frank Maßing forpasis en juna aĝo. Pri tio informis nin mortatestoj.

Nekrologoj rakontis, ke Abraham Morton estis masono, havis du infanojn kaj estis konata persono en Madisono; Jesse Longfield havis ok infanojn kaj estis katoliko; ja TJ Ross estis masono kaj ŝtatkonsilisto. La historion sufiĉe pliriĉigis ĵurnal-artikoloj. Tiel, John Longfield estis gardisto kaj oni neniam trovis liajn murdistojn. Joseph Huebel mortis, klopodante eltiri pneŭmadikon de iu proksima laĝeto. Kaj en 1887, kiam estis kreita nia verda lingvo, oni pligrandigis la domon. Krome, ekzistas kelkaj enigmoj, kiujn s-ro Marko, ne divenis: Kial Morton konstruis la domon, kial Joseph forfalis de vagonaro, kial Ross tiel mallonge posedis la domon??? Jen estas temo por romano. Kaj dankon al M Shafroth.

*Araneo*

## De nia e-librejo

Okaze de la 100-jara datreveno de I. Lapenna (vidu Saluton! 2009, 5) la Fondaĵo Ivo Lapenna tre afable vin petas dissendi la suban liston al la usonaj kaj alilandaj revuoj kaj retlistoj. Temas pri filmoj de Ivo Lapenna, mia edzo, kun kelkaj el liaj gravegaj paroladoj kaj prelegoj. Koran dankon. Amikajn salutojn, *Birthe Lapenna*, [www.ivolapenna.org](http://www.ivolapenna.org)

## Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktor' Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org/](http://www.esperanto-chicago.org/)

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;  
Familia membro : \$30, Regula: \$20  
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,  
Charles Gunn, 828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607

## KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.  
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

- 25an de Aŭgusto – UK en Bjalistoko (raportos partoprenintoj kaj kunlaborantoj)
- 22an de Septembro – Freskojn de Pompeo klarigas Karlo Offutt
- 27an de Oktobro – Viktoro P. rakontos pri sia vojaĝo al Ukrainio
- 24an de Novembro – elekto de nova gvidantaro kaj (?)
- 13an de Decembro – Zamenhofa tago en Evanstono

